RAPORTO DE LA KOMISIITO PRI VOJAĜ-AFEROJ
AL LA KONGRESO DE ELNA EN Tijuana, MEKSIKIO JULIO 27-30, 2007

Mi aranĝis bonan malmultekostan hotelon por niaj ĉeestantoj en la UK en Florenco, kaj tre sukcesan post-UK ekskurson al Malta. Partoprenis 28 personoj Pli ol duono estis el aliaj landoj - do vere internacia grupo. Detala raporto aperis en Esperanto-USA.

Pro la fakto ke la ELNA kongreso okazos en Tijuana, Meksikio, kaj flugoj tien estas multe pli altkostaj ol flugoj al San Diego, EVS rezervis motelon kaj kunvenlokon en Santee por la estraraj kunsidoj por aliaj kiuj volos turismi en San Diego. Ankaŭ EVS aranĝis luitan buson por porti nin de Santee, trans la landlimo rekte al nia hotelo en Tijuana. Mi aliĝis la la LKK kaj helpis Mar Cardenas kun aranĝoj ĉe hotelo Pueblo Amigo kaj la post-kongresa ekskurso al Ensenada.

Por la UK ĉi jare en Yokohama, Japanio, kiel kutime, mi reklamis en Esperanto-USA kaj forte rekomendis partoprenon. Sed pro manko de ebleco viziti Japanion antaŭ la kongreso, mi ne povis fari specialajn aranĝojn kiel kutime. Tamen, kelkaj Esperantistoj petis mian helpon - speciale se ili aliĝis malfrue aŭ havis komplikajn problemojn. Dum jaroj, bedaŭrinde, membroj emis fari individuajn aranĝojn kaj ne uzis Esperanto Vojaĝservon, escepte kiam ili havis problemojn. Tio ne rezultigis suifiĉe da profito por la kompanio por daŭrigi la servon. Pro tio, ĉi tiu jaro certe estos la lasta por EVS.

Se ni iam trovos iun kiu volos refoje krei vojaĝan servon por Esperantistoj, ELNA-anoj devos uzi ĝin pli multe. Membroj certe rajtas anticipi servon almenaŭ same bone kiel per la reto - sed ne necese malpli koste. Por havi la tempon kaj scion plani ekskursojn speciale por Esperantistoj en Esperanto, oni devas havi pli da klientoj.

Mi certe pretas ĝenerale helpi en la estonteco, kaj doni sugestojn al nova Esperanto Vojaĝ-Servo. Kiel membro de la Komitato de UEA, mi jam havos multe da informo kaj pretos daŭre helpi.

Lusi Harmon
Komisiito pri Vojaĝaferoj